William Blake,

# Le tigre

*tradukita de Félix Rose*

Tigre, tigre flamboyant d'ardeur
Dans les forêts de la nuit;
Quel pouvoir immortel, inouï,
Forma ta parfaite terreur?

Dans quels cieux, quelles profondeurs
Brûlait le feu de ton regard?
Quel vol osa donc vouloir?
Et quelle main saisit ce feu?

Et quelle puissance et quel art
Nouèrent les ligaments de ton coeur?
Dès ses premiers battements,
Quels pieds et griffes effrayant?

Quelle chaîne? Quel marteau?
Dans quelle fournaise était ton cerveau?
Quelle enclume? Quel poing effarant
Put gripper tes mortelles transes?

Quand les astres jetant leurs lances
Arrosèrent le ciel de pleurs,
Sourit-Il en te contemplant,
Lui qui fit l'agneau de douceur?

Tigre, tigre flamboyant d'ardeur
Dans les forêts de la nuit;
Quel pouvoir immortel, inouï,
Osa former ta parfaite terreur?

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger " de* WILLIAM BLAKE *(∗1757-11-28 – †1827-08-12) en franca de Félix Rose.*

*Arg-1048-2129 (2014-06-09 11:37:35)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/tigro.html`.

William Blake,

# La tigro

*tradukita de William Auld*

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝis kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo
Ardis via okulhelo?
Kia lin flugil' subtenis?
Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno.
Por vi tordiĝis kortendeno?
Kaj kiam pulsis batoj koraj,
Kiaj pied' kaj mano gloraj?

Kia martelo? Ĉeno kia?
Kia forn' por cerbo via?
Riskis kia fort' kolosa
Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malarmis
Kaj sur la ĉielon larmis,
Ĉu la verko al li karis?
Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝus kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger " de* WILLIAM BLAKE *(∗1757-11-28 – †1827-08-12) en Esperanton de* WILLIAM AULD *(∗1924-11-06 – †2006-09-11).*

*Arg-1048-2127 (2014-06-08 19:35:19)*

*Tiun ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la retejo* `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/tigro.html`.